**Bela Pollando: historia Sandomierz kaj Pipra Montaro**

Komence de ĉi-julio dum unu semajnfino ni vizitis Sandomierz, kiu ege plaĉis ambaŭ al mi kaj al Markéta. Ni eniris la reĝan urbon tra malnova pordego *Brama Opatowska*, ĉe unu el kvar iamaj turoj, kaj grimpis al ĝia pinto (je alteco de 30 metroj), de kiu bone videblas la tuta urbo. Poste ni promenis ĉe malnova urbodomo sur Ĉefplaco, kune kun aliaj turistoj kaj loka ĉiĉerono de Pola Turizma Organizo, kiu interese parolis pri iamaj kaj nuntempaj loĝantoj – reĝoj, nobeluloj, kalvinoj, katolikoj kaj judoj. Li ankaŭ rakontis al ni krimenigmon kaj instigis nin diveni ĝian solvon. Tio rilatis al du famaj filmoj faritajn en la urbo – *Semo de vero* (ĉefaktoro Robert Więckiewicz) bazita sur samnoma detektiva romano kaj *Patro Mateo* (ĉefaktoro Artur Żmijewski) pri pastro veturanta per biciklo tra la urbo kaj solvanta enigmojn helpante lokajn homojn, kies sinsekvaj epizodoj oni emitas en pola televido jam ekde naŭ jaroj.

Dum nia vizito okazis kavalira turniro kaj Jagelona foiro. Al Ĉefplaco venis – portantaj belajn mezepokajn vestaĵojn - reĝo kaj reĝino kun sia akompanantaro kaj kavaliroj sur ĉevaloj. En la regiono, de kiu devenis nevenkebla Zawisza la Nigra Kavaliro (1370 - 1428), ĝis nun estas viva kavalira tradicio.

Ni esploris bele ornamitan interne katedralon kun interesaj bildoj, inter alie pri 48 martiroj mortigitaj de Tataroj, promenis ĉe malnova 16-jarcenta lernejo “Collegium Gostomianum”, ĉe gotika Domo de Johano Dlugoso (1415 – 1480, kanoniko de Sandomierz kaj historiisto, kreinto de unu el plej gravaj verkoj de mezepoka historiografio eŭropa, diplomato kaj kleriko, kiu edukigis filojn de reĝo Kazimiro la 4-a Jagelono), kie nuntempe funkcias muzeo kaj apud la reĝa 14-jarcenta kastelo. **[** Ĉiĉerono klarigis al ni bezonon konstrui belajn atikojn (t.e. supra parto de konstruaĵo kiel muro, balustrado aŭ vico de pintoj kovranta tegmenton) – oni konstruis ilin por protekti tegmenton kontraŭ fajro kaŭzita ekzemple de fulmo. **]** Poste ni preterpasis vinberejon de Dominikanoj apud historia preĝejo de sankta Jakobo kaj promenis tra unu el kelkaj leŭsaj ravinetoj, 500-metroj-longa 10-metroj-alta Ravino de la reĝino Jadviga, kiu ofte vizitis tiun urbon. **[** Leŭso (alia vorto: loeso) estas sedimenta petro, kiu ekestas per la detruiĝo de aliaj ŝtonaĵoj. Plejparte ĝi konsistas el pulvora kvarco. Ĝiaj grajnoj (eroj), kiujn origine alportis vento, estas delikataj kaj egalmezuraj. **]**

Tuta grupo revenis al Malnova Urbo tra pordeto en urba muro, nomata *Trueto de kudrilo* (pole: *Ucho igielne*), inter dominikana monakejo kaj ilia preĝejo. Ĉiĉerono antaŭe timigis kelkajn turistojn dirante, ke nur maldikuloj eblos trairi tra la pordeto kaj aliaj devos reveni kelkajn kilometrojn per la sama vojo reen. Tamen, tio montriĝis esti ŝerco kaj ĉiuj sukcese trairiris tien.

Vizitante la urbon ni preterpasis ankaŭ iaman sinagogon kaj eksciis de ĉiĉerono interesajn faktojn pri juda popolo loĝinta tie. Apud Ĉefplaco ni preterpasis lukazernan domon, kie loĝis [kiu apartenis al familio de] Mikołaj Gomółka (1535 – 1609), reĝa kortegano, unu el la plej grandaj komponistoj kaj instrumentistoj de renesanco (sur la muro de la konstruaĵo estas memortabulo pri tio). En la urbo laboris Majstro Wincenty nomita Kadłubek (1161 – 1223) - kronikisto, verkisto, reformanto, studinta sciencojn liberigitajn kaj ĵuron en Parizo kaj en Bolonio, kanceliero kaj kapelano de princo Kazimiro la dua Justa, unue ĉefo de kolegiato en Sandomierz, poste episkopo

en Krakovo, kiu fine de sia vivo komencis vivon monakan admirante rigorecon de cistercianaj asketaj praktikoj kaj aliĝinte al abatejo en Jędrzejów (kien li venis perpiede el Krakovo).

Posttagmeze ni ĝuis boatekskurson laŭ rivero Vistula. Kapitano de la boato demandita kien ni veturos, ŝercis, ke unue al Varsovio kaj poste al Krakovo, ĉar fakte ambaŭ urboj kuŝas ĉe la sama rivero kiel Sandomierz sed je kelkcentkilometra distanco unu de la alia. Ekskurso per boato estis mallonga sed interesa: ni ĝuis rigardon de bela naturo ĉe la riverbordo kaj de bela panoramo de la historia urbo.

**[** Sandomierz ekzistis jam en 1113 jaro ĉar tiam Galo Anonimo menciis ĝin en sia kroniko. En 1138 ĝi estis enskribita en testamento de la reĝo Boleslavo la 3-a Kurbabuŝa. En 1241 ĝi ricevis urbajn rajtojn de princo Leszek Czarny; tiam oni konstruis preĝejojn kaj monakejon de Dominikanoj. En 13a jarcento la urbon tri foje atakis Tataroj bruligante ĝin kaj mortigante loĝantojn. Rekonstruitan urbon sur najbara monteto en 1349 bruligis Litvanoj, kiuj tamen poste fariĝis niaj aliancanoj dum granda batalo ĉe Grunwald. La reĝo Kazimiro la 3-a la Granda rekonstruis la urbon post la incendio anstataŭigante lignajn konstruaĵojn pere de domoj faritaj el ŝtono kaj briko. La urbo disvolviĝis danke al komerciistoj, kiuj venadis tien laŭ rivero Vistula survoje el Krakovo al Toruno. Mono ricevita de ili permesis konstrui novajn domojn kun profundaj keloj por stoki varojn (nuntempa subtera turisma itinero), krom tio grenejojn kaj fortikaĵojn. Bona periodo estis ĉesita de sveda diluvo (konkero). La invadantoj detruis kastelon, bruligis preĝejojn kaj grenejojn. Tuj poste la urbon invadis armita ekspedicio gvidata de hungara princo Rakoczy, kiun sekvis pesto signife malpliiginta loĝantaron. Renaskiĝo de la urbo okazis dum regado de la reĝo Johano la 3a Sobieski, kiam la urbo kaj ĝia loĝantaro denove kreskiĝis. **]**

La krono trovita en 1910 en Sandomierz kune kun kasko kaj pinto de lanco, apartenis al Kazimiro la Granda. La reĝo vizitis la urbon 18 foje dum la jaroj 1333-1369 kaj spendis tie sume 25 monatojn.

En la urbo aĉeteblas, ĉe juvelisto aŭ ĉe merkata placo, unika "*stria siliko*" (pole: *krzemień pasiasty*) - t.n. „*ŝtono de optimismo*", konata ankaŭ kiel „*pola diamanto*", kiu troveblas nur en tiu regiono sur la tero de Sandomierz kaj nenie alie en la mondo. Jen priskribo, kiu akompanas ĝin: „Stria siliko akcelas energion, plibonigas vivecon, forigas lacecon kaj protektas kontraŭ negativaj eksteraj influoj provizante vin je spirito de ĝojo kaj optimismo". Sendpende ĉu vi kredas tion aŭ ne, mi certigas vin, ke la ŝtono estas belega kaj volonte mi aĉetis ĝin por donaci al proksimaj personoj.

Dimanĉe ni vizitis, troviĝantan apude, *Pipran Montaron*, tio estas *la plejn malnovajn montojn de Pollando,* kiu estas parto de *Sanktokruca montaro*. En la montara naturrezervejo eblas rigardi *malfermejojn de kambriaj skistejoj* (pole: *wychodnie łupków kambryjskich*, t.e. geol. la lokoj, kie la roko etendiĝas super la surfaco de la tero) *kies rokoj aĝas pli ol 500 milionoj da jaroj*, krom tio stepo-vegetaĵaron kaj maloftajn speciojn de faŭno kaj flaŭro. Ni aŭdis kantantajn birdojn, vidis cervinon apud natura akvorezervejo sube kaj renkontis belan helverdan lacerton, kiu ĝuis varmajn sunradiojn kuŝante sur ŝtono ĉe plantoj. Supre de la montaro ĉe la vilao "Sovaĝa rozo"

en la loko nomata Kamień Łukawski situas *la plej granda natura rozĝarendo en Eŭropo* kaj kreskas fruktoarboj.

Oni nomigas Sandomierz „*La Malgranda Romo*" pro multaj similecoj al la ĉefubro de Italio. Ambaŭ urboj kuŝas *sur sep montetoj apud rivero* kaj havas vizitindajn *subteraĵojn* (en Romo katakumboj, en Sandomierz longaj koridoroj). Ankoraŭ alia simila urbo estas ĉeĥa Brno. Sandomierz vizitindas ankaŭ pro *bongusta vino*. Danke al taŭga *mikroklimato, simila al la itala*, multaj *sunplenaj tagoj* kaj *taŭga formo de tero* en la urbo kaj ĝia najbareco troviĝas *multaj vinberejoj, kie oni kultivas vitojn*. Por gustumi glasetojn de diversaj tipoj de vino (anstataŭ aĉeti tutajn botelojn) ni vizitis – laŭ konsilo de nia ĉiĉerono - iaman stokejon de pomoj en la urba parko „Piszczele", kun rondigita fronto, kie nuntempe funkcias restoracio nomata "Bistro". Aĉetindas ankaŭ surloke produktita "*Nalewka Sandomierska*" (alkoholaĵo farata de fruktoj, radikoj, floroj aŭ herboj) ekzemple tiu el ĉerizoj, krom tio medoj (alkohola drinkaĵo, farata el mielo, kiun oni diluas per akvo aldonante giston por ke la likvaĵo fermentu, ekzemple *Duonmedo de Sandomierz*, *Trionmedo de Sandomierz* – pole "*Dwójniak Sandomierski*", "*Trójniak Sandomierski"*) kaj bongustaj *Pomsukoj de Sandomierz*, kelkaj miksitaj kun aliaj fruktoj kiel piro, frambo, karoto, aronio aŭ ribo.

Bongustis loka manĝo „*Vojaĝsako de Arbarano*" (pole: „*Sakwa Gajowego*" - viando plenigita de brasiko kaj fungoj, servita kun rostitaj terpomoj kaj salato de betoj), kiun ni tagmanĝis en restoracio *„Sub la Mezepoka Ŝuo"* (pole: „*Pod Ciżemką*") apud Ĉefplaco. Pli proksime al katedralo vizitindas restoriacio „*En la malnova bakejo*" (pole: „*W starej piekarni*"), kie oni povas gustumi pecetojn de diversaj panoj kaj manĝi bongustajn lokajn supojn ekzemple „*Zalewajka Sandomierska*" aŭ gustumi „*Zlepieńce*" (delikataj, fragilaj pasteĉoj, prilaboritaj el viando kun diversaj plenigaĵoj kaj ajlo-herba saŭco). En loka nutraĵvendejo aĉeteblas diversaj tipoj de *Molaj bombonoj* (pole „*krówki*"), ĉiu akompanata de eta teksto pri iu loka legendo: "*Gantoj de Reĝino Jadviga*", "*Pri Halina Krępianka, kiu malliberigis Tatarojn en subteraj koridoroj*", "*Pri la ekesto de la urbo*", "*La tilioj de sankta Joĉjo*", "*Piszczele*", "*Pri monteto Salve Regina*", "*Pri Henriko de Sandomierz kaj belega Judit*", "*Pri Teresa Izabela Morsztynówna, la filino de la reganto de Sandomierz*".

Estis sunplenaj someraj tagoj kaj varmege. Je feliĉo en la urbo en multaj lokoj oni vendis bongustajn glaciaĵojn kaj en nia hotelo nomata "La Malgranda Romo" funkciis naĝejo, refreŝigis nin ankaŭ ekskurso per boato laŭ la rivero.

Tra la urbo gvidas ruĝa turisma itinero kaj - markita per ŝeloj - itinero de sankta Jakobo tra la Eŭropo, kiu finas en Santiago de Compostela.

Mi rekomendas viziton al Sandomierz – la urbo plenplena da historio kun agrabla etoso kaj al apuda Pipra Montaro por ĝui naturon. Veninte tien nepre aĉetu unikan ŝtonon de optimismo kaj ĝuu gustumadon de lokaj vinoj!

Adam Wilkus /16.7.2017/

Plia informo:

**La Urbo Sandomierz:**
https://eo.wikipedia.org/wiki/Sandomierz

**La Pipra Montaro:**
www.przewodnicy.sandomierz.pl/gory-pieprzowe-w-sandomierzu
www.sandomierskie.com/Sandomierz/pieprzowe/pieprzowe1.htm
www.wildrose.pl

**Itinero de Pomoj kaj regionaj manĝoj en la regiono de Sandomierz (Sandomierski szlak jabłkowy + potrawy regionalne)**:
www.szlakjablkowy.pl/
www.szlakjablkowy.pl/szlak-apetyczny.html
Sok jabłkowy - owoc sandomierski - z gruszką, maliną, marchewką, aronią, porzeczką
www.owocsandomierski.pl/#/oferta/
Miody pitne – Sandomierski Półtorak, Sandomierski Dwójniak, Sandomierski Półtorak
www.sandomierski.com.pl/miody-pitne.html
https://eo.wikipedia.org/wiki/Medo

**Itinero de vino en la regiono de Sandomierz (Sandomierski szlak winiarski):**
https://eo.wikipedia.org/wiki/Vino
www.szlakjablkowy.pl/szlak-winiarski.html
www.sandomierz.pl/dla-turysty/informacje-dla-turystow/sandomierski-szlak-winiarski
www.winoziemisandomierskiej.pl
**Winnica Płochockich** (Wilczyce): Szczeppy/Gatunki wina: Ma-Fo, Rose, Hibia, Zyberius, Sibemus
www.winnicaplochockich.pl
**Winnica Nad Jarem** (Samborzec)**:** Białe wina: Bianca, Hibernal, Muskat Odeski; czerwone: Regent, Rondo, Zweigelt. www.winnicanadjarem.pl
**Winnica Nobilis** (Samborzec) www.facebook.com/winnicanobilis
**Winnica Modła** (Ostrowiec) www.winnicamodla.pl
**Winnica Carolus** (Rytwiany) www.facebook.com/winnicacarolus
**Winnica Kędrów** (Samborzec)
**Winnica Król** (Wilczyce) www.szlakjablkowy.pl/4.-winnica-krol.html www.krolwino.com
**Winnica Malucha** (Sandomierz): Sibera, Muskat Odeski, Seyval Blanc, Regent
www.szlakjablkowy.pl/3.-winnica-malucha.html www.winnica-malucha.pl

**Winnica Rytwiany** (Rytwiany): www.facebook.com/Winnica-Rytwiany-592828824217513/
**Winnica św. Jakuba - u Dominikanów** (Sandomierz): Hibernal, Solaris, Cabernet Cortis, Regent, Seyve Villard, Einset Seedless, Blanka, Alden, Rondo, Muscat Odeskij, Aurora, Konkord Rosyjski, Iza. www.szlakjablkowy.pl/6.-winnica-sw.-jakuba.html
www.sandomierz.dominikanie.pl/zwiedzanie/winnica/
**Winnica Sandomierska** "**Sandomirus**" (Dwikozy): Seyval Blanc, Hibernal, Maerchal Foch, Solaris, Rondo, Johanniter, Leon Millot, Regent, Cabernet Cantor, Muscaris , Roesler, Dornfelder
www.winnicasandomierska.pl
**Winnica Faliszowice** (Samborzec): Regent, Rondo, Marechel Foch, Muscat, Solaris
www.szlakjablkowy.pl/1.-winnica-faliszowice.html
**Winnica u Gołębiewskich „Na Zawrocie"**(Klimontów): Alden, Aurora, Elmer, Himrod, Iza, Schuyler, Konkord rosyjski, Kokord europejski, Seidel, Supaga, Seyve villard, Reform, Bianca, Merlot, Cabernet, Seyval www.szlakjablkowy.pl/2.-winnica-na-zawrociu.html
**Winnica Paterkówka** (Sandomierz): Muscat Odeskij, Bianka, Sibera, Seyval Blanc, Rondo, Regent www.szlakjablkowy.pl/5.-winnica-paterkowka.html
**Winnica na Rozdrożu** (Samborzec) www.facebook.com/Winnica-Na-Rozdro%C5%BCu-289313461267799/